



BULTENO
DE

Malaga
Esperanto
Grupo

la Genâĉero

no 8

Aŭgusto

januaro 1975a

PARTOPRENU ĈIAM

Kvankam oni konas, pli ol antaŭe, Esperanton en Malago, ni ne rajtas vegeti pensante, ke nia idealo estas sufiĉe disvastigita kaj akceptita. Bedaŭrinde la Socio -kaj kompreneble, nia urbo- malprettas ŝanĝi siajn kulturajn kliŝojn kiam temas pri io tradukenda en konkretajn agadmanierojn. Multaj ĝuas legante aŭ aŭskultante la vantagojn de nia interna lingvo kaj esprimas iumaniere sian simpatian al Zamenhofa Lingvo. Tio laŭdindas, ĉar pravigas nin kaj fortigas niajn opiniojn fronte al la ceteraj. Sed tio ne sufiĉas por antaŭenpuŝi efike la Movadon.

Necesas plenumi akurate ĉiun etapon planitan. Tio utilas, ĉefe, por kredigi ekstermovadanojn je ni, esperantistoj. Alie, oni pensas, ke nia afero estas malserioza kaj bagatela. Ĝuste pro tio, mi petegas ke ĉiu grupano respondecu kaj plenumu sian taskon en nia organizo, kuraĝu partopreni kiel ajn kaj kapabliĝu laŭeble.

Ne validas ĝentilaj vortoj, nek promesoj, nek fizika ĉesto. La mezuro de la esperantisteco de ĉiu samideano estas la reale, la celoj atingitaj. Profitu, do, ĉi somerajn feriojn por vivi esperantistece!

Andrés

(2)

NIA GRUPO

Saluton denove al ĉiuj:

Ne, ne miru, ke tiel baldaŭ aperu nova ekzemplero. Se vi legis la pasintan numeron, vi scias, ke ĝi estas la koncerta numero de la monatoj Marto-Julio. Pro tio, ni decidis eldoni eksterordinaran numeron dum Aŭgusto por, tiamaniere, atingi denove nian kutiman dumonatan ritmon. Do, la du venontaj numeroj koncernas la monatojn Septembro-Oktobro kaj Novembro-Decembro.

Bone, alio: la venontan monaton, tio estas, Septembro, okazos ĝenerala grupkunveno (ĉu vi memoras pri tiu de la pasinta jaro?). Ni parolos (diskutos) pri:

- (re)elektado de prezidanto(ino), sekretario(ino), kasisto(ino).
- biblioteko kaj ĝia funkciado.
- revuo, respondeculoj kaj helpantoj.
- disponeblaj financrimedoj, ĉu oni devas plialtigi la kotizojn?, ĉu vendi loterion aŭ ion tian?
- abono al diversaj internaciaj revuoj (Monato, Esperanto, ktp.)

Rememoru, ke ĉiu rajtas proponi sin aŭ alian kiel kandidaton al la preparolitaj postenoj. Oni voĉdonos.

Ne forgesu, ke la dato por la kunveno estas

LA 26an DE SEPTEMBRO (de ĉi tiu jaro, kompreneble

je la sepa horo vespere.

Ni petas ĉeeston de ĉiuj membroj. Dankon.

Ĝis la venonta numero!

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem

LA MOVADO

(3) (4)

Refoje ĉi tiu paĝo sciigos vin pri la movado en Andaluzio. La ĵusa Andaluza Kongreso ankoraŭ estas en la memoro de ĉiuj partoprenintoj kaj ni konsideras, ke estas oportune publikigi ties rezoluciojn. Jen ili.

KONKLUDOJ KAJ REZOLUCIOJ DE LA 3a ANDALUZIA KONGRESO DE ESPERANTO

en Seviljo, de la 15a ĝis la 18a de Aŭgusto, 1985.

-Pri "Gazeto Andaluzia".-

Oni decidis, ke la eldonkvanto estu 100 ekzempleroj, la enhavo 16 paĝoj kaj la venonta numero aperu fine de septembro (numeroj 8 kaj 9). Oni plibonigos ĝin ĉiusece.

-Pri "Libroservo de AEU".-

Limigi la rolon de la Libroservo de AEU nur al la vendado de esperantaĵoj kreitaj de ĝi. Por cetera materialo, oni informos ĉiujn AEU-anojn pri la Katalogo de la Libro-servi de HEF (Hispana Esperanto-Federacio).

-Pri "Arĥivo-Servo de AEU".-

Daŭrigi la laboron de nuntempa Arĥivo-servo kaj instigi ĉiujn Grupojn kaj membrojn al la konstanta sendado de materialo por riĝigi ĉi tiun I Sekcion.

-Pri la venonta Kongresurbo.-

Oni elektis la urbon

Granado kiel sidejo de la venonta Kongreso (Aŭgusto 1986)

(Daŭrigas)

(4)

ILEI

Paĝoj

Pri "Kapabligu nin pedagogie"

(Daŭrigo)

"Metodikoj Uzitaj por Instrui en Esperantujo.-"

a) La gramatika.- Estas la plej malnova kaj regis ĝenerale en la pasinta jarcento en fremdlingva didaktiko. Kvankam ĝi ne estas la plej bona oni devas rekoni, ke la unuaj esperantistoj ne ĝuis alian instruilon kaj malgraŭ tio ili sukcesis ĉe la studo de la lingvo. Ĉi metodosekvis la lernolibro de Caré.

b) Post la unua Mondmilito aperis lernolibroj en Esperanto laŭ la nova metodo. Ĝia karakterizo estis "instigi la lernanton paroli. La rimedo konsistis el mallongaj raportoj kaj artikoloj kun indikoj al paroligo de la lernanto. Tiam aperis bildolibroj de aŭtoroj kiel Orell Fussli kaj Thora Goldschmidt, inter aliaj, por paroligi.

c) La metodo de Berlitz ne eniris en Esperantujojn. Sajne, oni opiniis, ke Esperanto lerneblas helpe de naciaj gramatikaj konoj, pli rapide ol per la Berlitz-a metodo. Plie, ĉi metodo disvastiĝis tra la mondo dank'al la instruado de ĉiu fremda lingvo fare de la responda naciانو. Tial, la korekta prononcado ne okazis tiom pro la aplikado de la metodo, kiom pro la influo de la responda instruanto denaske parolanta la lingvo kiun lernigis.

ĉ) La Cseh-metodo. Ĝiaj karakterizoj estas, laŭ "Enciklopedio de Esperanto":

- neuzado de lernolibroj,
- neuzado de nacia lingvo,
- komuna flora respondado de la kursanoj,
- aplikado de konversacio pri aktualaĵoj anstataŭ uzado de lernejecaj ekzemploj,
- riĉa aplikado de jumoro akj serco,
- instigo al tio, ke la lernantoj mem eltrovu la regulojn de la lingvo kaj ke ili mem konstruu la gramatikan sistemon.

Kontraŭe, la plej grava malavantaĝo de ĉi metodo estas ĝia troa daŭreco por akiri gramatikajn konojn. (La Cseh-metodo konsistas el 40 lecionhoroj).

d) Privat-metodo. Ĝi konsistas el 50 lecionoj kaj taŭgas por paroligi. La responda verko de E. P. Privat titoliĝas "Kursa Lernolibro".

e) Zagreba metodo. Baziĝas sur la logikastrukturo de E-o kaj la rezultatoj de vortofteca esplorado de parolata lingvo. Ĝia nomo devenas el tio, ke ĝi estis kreita de zagrebaj samideanoj."

"La rolo de la instruisto de idiomoj."

La fundamenta principo estas havigi la atingon de 4 bazaj lingvaj lertecoj.

En la regado de ĉi tiuj aspektoj oni distingas 3 nivelojn, respektive rilatajn al:

- prononco, ritmo kaj tono
- gramatika morfosintakso
- leksiko

Ĉion ĉi tion oni devas atenti, kiu ajn estu la metodo elektita. Tamen, por ke ĉiu metodo estu tia, devas enhavi:

- 1.- Elekto de la instruendaj eroj
- 2.- Gradigo, tio estas, determini la ordon instrui ĉiun eron.
- 3.- Prezento, tio estas, konkreti la plej taŭgan manieron prezenti la elementojn por ke oni povas lerni ilin kiel eble plej efike.
- 4.- Ripetado, ĉar la praktikado necesas por sukcesi."

Ni esperas ke ĉi tiu ekzemplo plaĉu al vi. Restas klare difinita la celo de ĉi tiu verketo: helpi pere de la konsiloj enhavataj en ĝi, ĉiujn kapabligantojn.

Ĉi foliaro (17 entute) vi trovos en la sidejo de nia grupo.

Saluton al ĉiuj!

LETEROJ AL LA DIREKTORO

Antaŭ dek minutoj venis la 7a numero de "La Cenafiero". Unu ties artikolo tuŝis min. Ĉu eble ĉar mi havus kaŝitan kulposenton? Mi ne scias. En ĉia okazo "Samideanino" prave rimarkis, ke al la studentoj mankas tempo por senriske dediĉi siajn fortojn al ajna poresperanta agado. Pri nestudentoj mi ne parolu, ĉar proprasperte mi ne konas tian staton.

Nu, mi konsentas. Prinoipe kaj unuavide, ĉiu poresperanta sekundo estas forrabita el la porstudada tempostoko. Sed ĉu vere? Ni haltu kaj rigardu, kion ni kutimas fari. Se ni estas eksterordinare diligentaj, ni studas kaj studadas, ĝis ni laciĝas tiel, ke ne eblas daŭrigi. En tia momento ni haltas kaj diras al ni mem: "Ne plu! Mi estas terure laca!". Kaj nun pri la sekvo.

Ĉu vi rimarkis, ke post apenaŭ paŭzeto, la spertita ripozo portas al vi agrablan senton, kvazaŭ vi ripozas por ĉiam? Atentu, mi proponos al vi ion. Jen vi studis (multe aŭ malmulte), laciĝis kaj diris: "Fino! Nenial ajn mi daŭrigos!". Konsentite, vi pensis tion kaj ekripozis. Nun la propono: ĉesu remaĉi tiujn vortojn (ili nur plilacigus vin) kaj ripozu, vere ripozu; rimarku, ke vi ripozas; nur rimarku. Kiam vi ĉesis ripeti kaj vortumi tiun penson (vi jam konas ĝin; kial repensi la samon?), versaĵne la okuloj ne plu doloras. Jen vi estas iel "nedefinita", kvazaŭ komputilo sen ordonoj. Vi povas ĝoji, ke en tiu momento vi ne studas. Tio ne estas banala stultaĵo, sed profito tirebla el la menciita "nedefiniteco" per la deziro ĝoji. Kial ne inklinigi la pesilon al la ĝojo?

Kaj jen la salto; el la ĝojo al la agemo. Ĉu vi troviĝas inter tiuj, kiuj, se ĝojaj, pretas fari ion ajn? Se jes, jen via vico. Vi studis, laciĝis, ripozis, ĝojiĝis kaj... kio nun? Kiel plenigi la vakuon, la mankon, kiun la ĝojo kunportis? Al vi la decido. Do lasu la vortojn en via kapo

(Daŭrigas sur la paĝo 11a)

SAPOL: KIBL III MURKIAS

(El la postata numero)

Bonvenon al ĉiuj:

Fresdatajn novaĵojn ni donos al vi per ĉi tiu artikolo. En Septembro okazos en Madrido, de la 20a ĝis la 23a, la Nacia Generala Kunveno de HEJS, Hispana Esperantista Junulara Societo. Ĝin povas partopreni ĉiuj membroj kaj ankaŭ la gejunuloj nemembroj, kiuj interesigas pri la junulara hispana movado.

Laŭ la de ni ricevita letero, la pritraktotaj temoj estas:

-Venonta Tendaro en Zaragozo;

-Diplomoj de HEJS;

-Broŝuro pri Esperanto por junuloj;

- "Pandemonio" (temas pri la unua libreto, kiun eldonos, per la helpo de AEU, la kolektivo "Junaj Sendependaj Verkistoj", ĵus naskiĝinta dum la 9a HEJS-Renkontiĝo);

-Komputor-amantoj por Esperanto (estas frukto de la pasinta Andaluzia Kongreso kaj la Kurso pri lingvo BASIC gvidata de samideano Miguel Angel Sancho Pardo);

- "Kontakto" (HEJS intencas havigi al siaj membroj la revuon "Kontakto" anstataŭ la ĝisnuna "Konĉeze"; persone mi apogas ĉi tiun proponon);

-Rilatoj al ŝtataj kaj privataj neesperantistaj instancoj;

-Financoj kaj administraĵoj.

Tio estas la laborprogramo. Eble oni partoprenos en nek-ta kultura aranĝo, vizito al muzeo "Prado", ktp.

Vi povas aliĝi rekte telefone (Miguel Angel: (91) 469 68 60) aŭ skribe, plenumante la aligilon, kiun vi povas peti al samideano Rafael. Ĝis!

Rafael

(Daktilo)


Ĉefredaktoro: Rafael

(8)

SCIENCA PAĜO


SAPOJ: KIEL ILI FUNKCIAS
(El la pasinta numero)

Dume la hidrokarbidaj partoj direktas sin al la interna spaco de la partetoj, reciproke altiritaj inter ili. Tiuj partetoj ricevas la nomon de miĉeloj.



- 1: Longa ĉeno hidrokarbida. Ĉiu ĉeno estas formita el unu atomo de Karbono (C) kaj du de Hidrogeno (H), escepte de la unua, kiu havas tri Hidrogenatomojn.
- 2: Polara grupo konsistanta el Karbono, Oksigeno (O) kaj, ekzemple, Natrio (Na).

Tiaj miĉeloj konsistas el centoj da molekuloj ĉirkaŭitaj de unu aŭ pliaj tavoloj de adsorbitaj molekuloj de akvo, kiuj malebligas la kunigon de la miĉeloj inter ili kaj donas grandan stabilecon al ĉi tiu speco de koloidoj.



Skema formo de sapa miĉelo.
reprezentas akvon.

En la stabilaj solvaĵoj de hidrofilaĵ koloidoj, ekzemple, sapo en ekvo, ekzistas perfekta ekvilibro inter la altiraj fortoj de samspecaj molekuloj (en nia ekzemplo, sapo-sapo kaj akvo-akvo) kaj la altiraj fortoj de malsamspecaj molekuloj (sapo-akvo).

Kunlaboraĵoj (9)

ION PRI JULIO VERNE, NUN KAJ ĈIAM

Je bonega samideano kaj pli bona
amiko, kiu ankaŭ nomiĝas JULIO.

Kiam la pasintan semajnon mia ekjara kuzeto demandis min ĉu la libro kiu staris en mia ŝranko estis la tre fama "Monda Vojaĝo en Okdek Tagoj" de Julio Verne mi vere surprizigis. Mi agnoskis ke estis mirinda ke infano konu ĉi majstran porjunulan verkon. Mia kuzeto asertis min ke li konis perfekte tiun romanon, tamen ne pro la legado aŭ pro lernejaj lekcioj, sed ja pro la televido. Mi ekmalconfidis. Mia kuzeto komencis rakonti al mi la intrigon: "Jes, kara kuzo, ĝi temas pri leono kiu nomiĝas Willy Fogg kiu kune kun eleganta kato, Rigodon, kaj sprita andaluzia muso deziras fari vojaĝon ĉirkaŭ la Tero en malpli ol okdek tagoj". Mia surprizo estis granda, ĉu iu televida reĝisoro kuraĝis fari fablon el ĉi tiu verko? Ŝajnas ke jes. Mi ĉiam apogis la ideon pri diskonigi la Literaturon al la infanaro pere de fabloj, tamen mi ne estas tute certa ĉu estus tre taŭga fari fablon el junula libro, mi opinias ke ne.

Kaj mi apogas ĉi aserton dirante ke la Verne-a Literaturo havas ion specialan en ĝia legado sed perdas ĉi magion kiam oni vidas ĝin en filmoj. Kiam mi estis dekjara mi legis "La Mistera Insulo"-n; laŭ mi estis beleĝa libro ĉar mi mem imagis proprajn pejzaĝojn, vizitaĝojn, ktp; tamen kiam du jarojn poste mi vidis en la televido "La Mistera Insulo"-n kun Omar Sarif kiel ĉefrolulo mi ja maliluziigis. La filmo estis tre bona kaj alloga, sed ĝi estis malsimila al tiu "filmo" kiun mi mem imagis en mia cerbo dum la legado de la libro. La televido povas esti perfekta komunikilo kaj eĉ la plej adekvata ilo por disvastigi la kulturon inter ĉiuj, sed pli kutime nur estas prokrastilo por aliaj okupoj, kiel la legado.

malfortigi kaj malaperi. Vi staras antaŭ vi mem. Kion vi volas? Ĉu Esperanto interesas vin? Estu sincera. Se jes, vi scias kion fari, aŭ vi povas demandi, ĉu alia scias.

Nu, kiel videble, la skizita ludo povas funkcii kondiĉe, ke vi volu, ke ĝi funkciu. Kaj se vi vere volas, vi povas fajfi pri tiu ludo kaj rekte agi sen trompoj kaj sen trukoj, ĉar ankaŭ la vortoj "Mi estas laca" ne trompos vin. Ĉu vi ne havas tempon? Sed amik(in)o, kiom da kvin-minutoj vi perdis "nur por ripozi momenteton"? Krome, vi eble rimarkis, ke la cerbo misfunkcias, se oni atentis tro longe la samajn aferojn. Da ŝanĝu, saltu al alia mondo dum kelka tempo; ĝi efikos kvazaŭ sonĝo. Ĉu vi timas? Tiam profitu Esperanton por via studado. Kontaktu saminteresajn esperantistojn, eĉ se nur perkoresponde; tio certe largigos vian panoramon en via fako, kaj povas alporti nur avantaĝojn.

Sed memoru, ke neniu devigas vin al Esperanto. Vi estas (teorie) libera. Se vi decidis labori por ĝi, vi respondecas nur antaŭ vi mem; ĉia senkulpigo superfluas. Pensu nur, ke ĝi ne estas vojo el rozoj (laŭ mi, ankaŭ ne el dornoj). Rigardu al viaj okuloj kaj difinu klare, sur kiu tereno vi staras; kion vi volas fari. Tiam agu. Tamen, se vi jam devigis vin al io, ne trompu (nek rompu) la esperojn, vi vekis ĉe aliaj.


Denove al vi la decido.

Rikardo Felipe Albert Reyna


-----oooooooooooooooo-----

PLIAJ ANONCETOJ
(Jes!, Jes!)

Aĉetu "Gvidilo Por Meza Kurso" ĉe Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, Trinidad Grund, 28 2ª, 29001 Málaga. Ĝia prezo, 300 pesetoj.



Komencu studi hodiaŭ! La ekzamenoj okazos dumpaske. Oni liveros la koncernajn diplomojn de AEU al la sukcesantoj.



(12)

KA "ALIROJ KAJ PAĜIOJ"

En iu insulo troviĝas du malsamspecaj loĝantoj: Kavaliroj kaj Paĝioj. Kavaliroj ĉiam diras la veron dum Paĝioj ĉiam mensogas.

Supozeblas, ke ĉiu insulloĝantoj estas jen kavaliro jen paĝio.

Tri loĝantoj - A, B, C, - troviĝis en ĝardeno. Fremdulo trafis pasi tra tie kaj demandis al A: "Ĉu vi estas kavaliro aŭ paĝio?". A respondis tiel konfuze, ke la fremdulo ne povis klarigi tion, kion A diris. Tiam la fremdulo demandis al B: "Kion diris A?" kaj B respondis: "A diris, ke li estas Paĝio". Sed ĝuste en tiu momento, C diris: "Ne kredu B-n, ĉar li mensogas!".

Kaj jen la demando: Kio estas B kaj C? Kial?

Alian tagon, A kaj B (ĉiu povas esti jen kavaliro jen paĝio) ripozis en la sama ĝardeno. A subite diras: "Almenaŭ nu el ni estas paĝio".

Kio estas A kaj B? Kial?

Se vi kapablas solvi korekte la du enigmojn sendu leteron al ni antaŭ ol la 15a de Oktobro:

Grupo de Esperanto "La Cenaĝero"

Centro Cultural de la G.F.U.

strato: Trinidad Grund, 28, 2ª Dcha. 29001-Málaga

Por la tri unuaj solvantoj ni havas unu alĝluaĵon "Ni amas Esperanton".

